

BRAZILA ESPERANTISTO

50-A JARO

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1956

N.º 510-511

BARBACENA — STATO MINAS GERAIS



Preĝejo "Boa Morte" (Bona Morto), unu el la 6 katolikaj preĝejoj en la "Princino de la Kamparo".

En Barbacena okazis la II-a Esperanto-Kunveno de Minas Gerais
(raporto en nia venonta numero)

ALIGU FRUE AL LA XV-A BRAZILA KONKRESO DE ESPERANTO!

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1956

50-a Jaro

N.º 510-511

BRAZILA ESPERANTISTO

«O Esperantista Brasileiro»

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGOSocieto de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921
Direktoro:**A. CAETANO COUTINHO**Respondeca redaktoro (redactor
principal):**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo
de Geografio**RIO DE JANEIRO — BRAZILIO**Senpaga por anoj de B. E. I.
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA
BRASILEIRA DE ESPERANTO
1956**(De acordo com os Estatutos todos os membros
são automaticamente filiados à organização
mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	60,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	150,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperanto»	250,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	400,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	1.500,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	5.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º****Rio de Janeiro, DF.****SE VI VOLAS ESTI DELEGITO**

Ĉiu sincera kaj celkonscia Esperantisto volas — kaj serĉas rimedojn — servi al la granda ideo, kiu nin ligas komune. Unu el la plej utilaj rimedoj, kunigante la idealon de SERVEMO kun tiu de PRAKTIKA APLIKADO, estas la ofico de Delegito. Tiu ofico donas al veraj samideanoj la eblon antaŭenigi nian aferon per unika elmontro de solidaro.

Se en via loko ne troviĝas Delegito (la vorto delegito inkluzivas D, VD kaj FD) kaj se vi havas inklinon oferi ion al via idealo, vin proponu. Tion faru tamen, ne en spirito de favor-faro al U.E.Ā. (kiu provizas nur la rimedojn) sed kun la konscio, ke la ofero estas al Esperantismo. Jen la simplaj reguloj, kompilitaj por garantii la efikan funkcion de la Delegita Servo:

1. Ĉiu Delegito bone posedu la lingvon Esperanto.

2. Delegito devas esti almenaŭ Membro-Abonanto, ĉar li bezonas la Jarlibron kaj la oficialan gazeton ESPERANTO.

3. Antaŭ ol rajti kandidati kiel delegito, oni devas esti individua Membro de U.E.A. jam unu jaron. (Montriĝis, ke multaj novaj membroj facilanime akceptas la oficon kaj same facilanime ne renovigas sian membrecon).

4. Fakdelegito reprezentas nur unu fakon, pri kiu li estu vere kompetenta. Ni ne akceptas fakojn fantaziajn kaj neseriozajn.

Se via kompetento konformas al la ĉi-supraj kondiĉoj, petu Delegit-Respondilon ĉe BRAZILA ESPERANTO-LIGO.

BRAZILA ESPERANTISTO

50-A JARO

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1956

N.º 510-511

DELEGADOS DA U. E. A.

O *Jarlibro* do corrente ano revela um considerável aumento do número de Delegados da Universala Esperanto-Asocio en nosso país relativamente ao total do ano anterior.

Esse auspicioso crescimento demonstra como está sendo felizmente compreendida a utilidade e, mais do que isso, a necessidade de que se estendam cada vez mais os admiráveis serviços da nossa instituição de âmbito mundial.

Hector Hodler, o grande idealizador e realizador da UEA, foi um nobre espírito que aliou o mais puro idealismo ao mais perfeito senso prático.

Fundada em 1908, UEA tem conservado através das vicissitudes de quase meio século o mesmo luminoso cunho que lhe imprimiu o seu talentoso fundador.

Desenvolvendo a sua acção em mais de oitenta países, UEA é uma das mais pujantes organizações de carácter universal, atualmente existentes.

Outras organizações internacionais realizam sem dúvida obra igualmente repetível e fecundã, mas falta-lhes uma língua comum e neutra para o completo entendimento entre os seus membros. UEA pode ufanar-se de possuir esse portentoso instrumento.

A sua rede de Delegados é por si só a irrefutável prova do imenso valor

do Esperanto e do alto teor do Movimento Esperantista.

Guia de que não prescinde nenhum esperantista activo, o *Jarlibro* é um verdadeiro mapa do nosso Movimento, de tal maneira que cidade que nele não figure praticamente se poderia dizer que não existe para o mundo esperantista.

A Liga Brasileira de Esperanto, filiada à UEA, não cessa um momento de insistir para o robustecimento da associação que orienta sãbiamente o rumo da acção esperantista. Para o ano do Jubileu da BEL acha-se esta vivamente empenhada em ampliar quanto possível o quadro de Delegados no Brasil. Sabe a nossa Liga que dessa forma trabalha para a sua própria grandeza, porque o Delegado da UEA é sempre o samideano com quem se pode contar a todo tempo e em qualquer situação.

Consultando o *Jarlibro* de um quarto de século atrás, ali encontramos os caros nomes de Paulino Santiago, Jaime Martins de Sousa, Ismael Gomes Braga, Ary Zamora e José Gomes Braga, constantes, fiéis e leais, perseverando devotadamente na boa obra a que se consagraram. O autor deste artigo honra-se com eles aparecer na lista dos Delegados no *Jarlibro* desse já remoto ano de 1931.

Quando tivermos um amigo perfeito como esses em cada uma das duas

mil e tantas cidades brasileiras, o nosso triunfo será incontestável e incontestado.

Pugnemos todos com esse alvo. Alistem-se como Delegados quantos satisfizerem as fáceis condições exigidas. A Liga terá sincera satisfação em acolher a proposta de todos os samideanos dispostos a essa tarefa meritória e bela de trabalhar com inigualável eficácia para a difusão da Língua Internacional.

Aquelas pessoas que, simpáticas à nossa causa, reconhecem no Esperanto a língua do futuro, a UEA responde pelos seus vastos serviços, pela sua utilidade prática, pela sua actividade mundial, que o Esperanto já é também o idioma dos dias de hoje.

C.D.

Italaj esperantistoj vizitis Brazilon

Inter la italaj delegitoj al la XVIII Internacia Kongreso de Geografio okazinta en Rio de Janeiro, estis la kleraj esperantistoj Profesoroj Umberto Toschi kaj Elio Migliorini. Afable akceptitaj de la brazilaj samideanoj, ili havis okazon fari promenadojn tra la ĉefurbo.

Prof. Toschi vizitis la sidejon de Brazila Esperanto-Ligo, kaj parolis ĉe la Radio-Ministerio de Edukado kaj Kulturo. Prof. Migliorini, okaze de ekskursoj tra nia lando vizitis en la ŝtato Bahia la urbojn Muritiba, kie li rekontiĝis kun nia samideano M. Borges Santos, kaj Cachoeira, kies Urbestraro regalis lin kaj la aliajn kongresanojn per bankedo.

BEL/UEA

QUOTAS ANUAIS PARA 1957

Tendo recebido da Universal Esperanto-Asocio comunicação da tarifa para o ano próximo vindouro, a Liga Brasileira de Esperanto estabeleceu as quotas de adesão às duas instituições.

Por motivos óbvios foi necessário alterar a tabela de contribuição. O aumento evidentemente não está em proporção com a elevação geral dos preços. A BEL assim procede no intuito de que no ano de seu Jubileu nenhum dos nossos prezados samideanos deixe de inscrever-se.

Para compensar, de alguma forma, a redução da nossa renda, confiamos, com agradecimento antecipado, que todos os que puderem, adiram como Membros Mantenedores ou Patronos.

Desejamos também lembrar aos consócios que a época justa para a adesão é o mês de novembro. A inscrição no tempo oportuno é duplamente útil: serve ao sócio, que assim não corre o risco de perder as publicações porventura esgotadas; e serve por igual às associações, que dessa forma já ficam sabendo em dezembro com quem podem contar para o ano seguinte.

O mesmo se diga com relação às assinaturas de revistas. O assinante pontual é um colaborador precioso.

QUOTA ANUAL

	Cr\$
Membro Simples (AM).....	60,00
Membro com direito ao Anuário (MJ)	150,00
Membro Assinante (MA)....	250,00

(Continua na pág. 7)



Brazila Kroniko

BAHIA

Itabuna — La Associação Itabuna de Esperanto okazigis solenan kunsidon kaj artan feston por memori la 14-an de Julio, daton tre karan al esperantistoj.

STATO RIO DE JANEIRO

Volta Redonda — Nia samideano João Andrade, optikisto, komunikas al ni, ke jam funkcias en tiu urbo lia okulvitra farejo, kiun li nomis «*Óptica Esperanto*».

SÃO PAULO

Per unuanima voĉdono la eksterordinara Ĝenerala Kunsido de São Paulo Esperanta Klubo elektis Vicprezidanto nian samideanon Kolonelo Cândido Bravo.

Ĉe la aŭditorio de la Komunuma Biblioteko la tra la mondo veturanto E. Nigmo faris paroladon en Esperanto, kiun tradukis portugalen nia samideano Darcy P.M. Gaia. La interesa parolado estis ilustrita per belaj koloritaj filmoj.

Ĉe la *Loja Teosófica São Paulo* faris paroladon pri Esperanto niaj samideanoj F-ino Astrogilda Guerrini kaj S-ro Benedito Cardoso Gomes.

Votuporanga — En la 12-a de Aŭgusto estas fondita «Votuporanga Esperanta Klubo» kaj elektita la unua estraro: Prez. Pedro Butignoli; Vicprez.

Valdemar Benini; 1-a Sek. Orivaldo Paulino Reganin; 2-a Sek. Amer José Feres; Kas. Joaquim A. Figueiredo. Gvidanto — Benedito Silva.

PARANÁ

Curitiba — Nian ŝatatan samideanon Geraldo Mattos oni elektis prezidanto de Paraná Esperanto-Asocio. Gratulon!

RIO DE JANEIRO (D. F.)

Leopoldina Esperanto-Klubo celebris per arta festo la datrevenon de sia fondo.

La unujara datreveno de la programo «Esperanto, Língua Internacional», dissendita de la radio-stacio Ministerio de Edukado kaj Kulturo, pri kiu ni raportis en nia antaŭa numero, estis memorigita per bela festo (18 Aŭgusto). Parolis D-ro Celso Brant, direktoro de la Serviço de Radio-difusão Educativa, D-ro Carlos Domingues, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo, prof. Torres Pastorjino, Jorge Soares das Neves kaj Luiz Carlos Nunes d'Angelo, prezentanto de la programo. Ple-numis kontentige la poezian kaj muzikan parton la sopranulino Consuelo Llort, la pianistino Ilca G. Goldschmidt, la muzikistaro de la Regimento Escola de Infantaria kaj la kanĥoro de la Associação Esperantista do Rio de Janeiro.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

En la arkivo de la veterana Brazila Klubo «Esperanto» estas zorge konservata la folio de papero kun la subskriboj de la personoj, kiuj ĉeestis la fundan kunvenon de la klubo en la 29-a de Junio 1906.

En la jubilea vespermanĝo okazinta en la 29-a de Junio lasta, tiu listo estis legita de la Prezidanto de la klubo, D-ro Miguel Timponi, kaj emocie aŭdita de la kunmanĝantoj.

Ni honorigas nian gazeton per la transkribo de la nomoj de tiuj karaj pioniroj:

E. Backheuser
Francisco Varzea
Lauriano das Trinas
Aprigio Carlos Iracema Gomes
Alberto Freire da Silva.
José Leandro Braga Cavalcante
Alfredo João Bastos
Ed. Campos
Candido Caetano Alves
Luiz Antonio da Cunha Jor.
Dr. Macedo Forjaz
Hernani da Mota Mendes
Oscar Nerval de Gouvêa
Dr. Filgueiras Sampaio
Dr. Adolpho Velloso
Benjamin Oliveira Junqueira
Raymundo Cantão
Alberto Couto Fernandes
José Couto Fernandes
Decio Lyra da Silva
Heitor da Nobrega Beltrão
Olegario Pereira de Azevedo
Francisco Furtado Reis
Ernesto Liebermeister
Honorio Leal

Heitor Bracet
José Arthur Boiteux
Arthur Reis
Arminio de Moraes
Armando de Pinho
Aldemaro Pessoa
Othelo Reis
Dr. Nuno Baena
Alberto Greenhalgh Barreto
Maurício Helmold
Eduardo de Carvalho Piragibe
Luiz Pereira Pinto Galvão
Mitah Serra Negra

La kunsido okazis ĉe salono de la ĵurnalo «O PAIZ», en la 29-a de Junio 1906.

Brazila Klubo «Esperanto» havis kiel Prezidantojn kelkajn el la plej eminentaj brazilaj esperantistoj. Jen ilia vico en la kvindekjara ekzistado de B.K.E.:

1 — D-ro Everardo Backheuser, katedra profesoro ĉe la Universitato de Brazilo, Akademiano, Prezidanto de BEL — 29/6/06-30/3/07.

2 — Medeiros e Albuquerque, membro de la Brazila Beletristika Akademio — 31/3/07-28/6/07.

3 — D-ro Alberto Couto Fernandes, civila inĝeniero, Lingvakomitato kaj Prezidanto de BEL — 29/6/07-28/6/10.

4 — Subkolonelo Lauriano das Trinas — 29/6/10-28/6/11.

5 — Generalo D-ro J.M. Moreira Guimarães, verkisto, diplomato kaj federacia deputito — 29/6/11-17/9/13.

6 — D-ro Venâncio da Silva, marista kuracisto kaj verkisto — 18/9/13-28/6/15.

7 — D-ro Nuno Baena, marista kuracisto kaj verkisto — 29/6/15-28/9/16.

8 — Generalo Manuel Portilho Bentes — 29/9/16-28/6/19.

9 — D-ro Antonio Carlos de Ar-ruda Beltrão, civila ingênio — 29/6/19-28/6/20.

10 — D-ro Hernâni da Mota Men-des, civila ingênio — 29/6/20-1/7/21.

11 — D-ro Nuno Baena — 2/7/21-10/11/22.

12 — Generalo José Silveira So-brinho, milita ingênio kaj verkisto — 11/11/22-6/7/23.

13 — D-ro Carlos Domingues, ka-tedra profesoro ĉe la Universitato de Brazilo, Akademiano kaj Prezidanto de BEL — 7/7/23-28/6/34.

14 — D-ro Luís da Costa Porto Carreiro Neto, katedra profesoro ĉe la Universitato de Brazilo, Akademiano kaj verkisto — 29/6/34-28/1/39.

15 — D-ro Hernâni da Mota Men-des — 29/1/39-6/6/41.

16 — Antonio Caetano Coutinho, veterano, tradukinto de la «Unuaj Lec-ionoj de Esperanto» de Cart kaj Di-rektoro de BE — 7/6/41-12/12/52.

17 — D-ro Miguel Timponi, advo-kato kaj iama Sekretario (Ministro) de la Internaj Aferoj kaj Sekureco de la Federacia Distrikto — 13/12/52.

(Conclusão da pág. 4)

Membro Mantenedor (MS)... 400,00
Patrono 1.500,00

O Membro Vitalício (DM) contri-bui de uma só vez com uma quota igual a vinte vêzes a do Membro Assinante.

LA NOBLEGA KREAJO

MERCÈDES BRAVO

Ĉu vi jam atentis kaj meditis pri la mirinda sunlumo?

Ĉu vi jam admirekstaziĝis antaŭ ĉarma stelplena nokto, antaŭ la milda lunlumo, antaŭ la vasteco de l'ĉielo, de la tero kaj de l'maro?

Ĉu vi jam atente rigardis la maj-estecon de la praarbaroj kaj la bel-econ de la floroj?

Ĉu vi jam aŭdis la harmonian kanton de la birdoj?

Ĉu vi jam aŭskultis la agrablan susuradon de l'venteto inter la foli-oj de la arbareto, la dolĉan murmu-radon de la riveretoj kaj la lulan plaŭdadon de la ondoj?

Ĉu vi jam sentis la magion de la muziko?

Ĉu vi jam pensis pri ĉiuj trezo-roj de la Universo?

Nu!

Ekzistas io, mirinda kiel la sun-lumo, ĉarma kiel stelplena nokto, mil-da kiel la lunlumo, vastega kiel la ĉielo, la tero kaj la maro, majesta kiel la praarbaroj, bela kiel la floroj, harmonia kiel la kanto de l'birdoj, agrabla kiel la susurado de l'venteto inter la folioj de la arbareto, dolĉa kiel la murmurado de la riveretoj, lula kiel la plaŭdado de la ondoj, magio-plena kiel la muziko, altvalora kiel ĉiuj trezoroj de la Universo!

Ĝi estas fido, espero, karitato!
Ĝi estas paco! Ĝi estas la plej granda el ĉiuj amoj, ĉar ĝi estas la propra amo de Dio!

Ĉu vi scias kio estas? Ĉu ne?
Estas ESPERANTO!



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



AUSTRÁLIA — *Canberra*. Para o Senado da Austrália Ocidental foi eleita uma mulher, pela primeira vez: a Senhora Ruy Hutchin,⁴ da cidade de Perth, uma das ativas e cultas esperantistas australianas.

BULGÁRIA — Após 8 'anos' de pausa, os esperantistas búlgaros tiveram a satisfação de realizar seu 32.º Congresso em Julho, na capital Sofia.

O Boletim de *Bulgara Esperantisia Societo*, de Agosto, traz amplas informações sobre o brilhante Congresso. Já foram restauradas 36 organizações esperantistas, tendo funcionado em 1955 mais de 50 cursos em todo o país.

CHECOSLOVAQUIA — Celebrou suas bodas de ouro sacerdotais Monsenhor Dr. Antonio Eltschkner, bispo auxiliar de Praga, decano do Cabido Metropolitano, atualmente a mais alta autoridade eclesiástica em função. Com prazer salientamos ser o acaçado, por todos respeitado bispo, competente esperantista há 31 anos, dominando magistralmente a língua internacional.

FRANÇA — Foi eleito membro da Academia de Ciências da França o Sr. Maurice Fréchet, professor de matemática na Sorbonne (Universidade de Paris), competente esperantista, que tem feito várias conferências na Sorbonne, como membro do Pariza Esperanto-Grupo.

ITÁLIA — Foi agraciado com o título de Cavaleiro Oficial da Ordem da República Italiana o Sr. Antonio Paolet, conhecido editor e impressor de livros de Esperanto em S. Vito de Tagliamento. O Sr. A. Paolet, nos seus 40 anos de atividade esperantista tem publicado milhares

de livros e métodos de Esperanto. Entre as traduções em Esperanto podemos citar: História de Cristo, de Papini; Coração, de Edmundo de Amicis, *Cursus Completus Esperanti* (curso de Esperanto em latim).

ISRAEL — Realizou-se há meses o 5.º Congresso esperantista, organizado pela Izraelanda Esperanto-Ligo.

IUGOSLÁVIA — CONGRESSO DE SAT. — Belgrado foi a cidade do 29.º Congresso de *Sennacieca Asocio Tutmonda*, em Julho. Foi o primeiro Congresso de SAT em território de língua eslava. Teve sucesso notável, com o comparecimento de cerca de 650 esperantistas de muitos países. O Congresso no próximo ano será em Rotterdam.

JAPÃO — Para comemorar o cinquentenário do movimento organizado esperantista no Japão, os samideanos desse país estão organizando o 43.º Congresso Jubilar dos Esperantistas Japoneses, em Tóquio, em Novembro próximo.

SUDÃO — O Ministro-Presidente sudanês Ismail El Ashari é esperantista, tendo aprendido a língua internacional há 24 anos, conforme esclareceu ao nosso samideano E. Nigmo, em visita que este lhe fez.

SUÉCIA — O Dr. Ebbe Vilborg, ativo esperantista, apresentou em sua tese sobre filologia, apresentada à Universidade de Goeteborg, um resumo em Esperanto.

URUGUAI — *Montevideo* — O Prof. Fernández-Menéndez pronunciou em um dos salões do "Ateneo" bela e aplaudida palestra — *Per Esperanto tra Eŭropo*, especialmente dedicada aos esperantistas.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

OS BOMBEIROS

OLAVO BILAC

Quem há, por aí, que já não tenha, ao menos, uma vez, tremido de susto e vibrado de comoção e entusiasmo, ao ver o trabalho, ao admirar a coragem dêsses bravos bombeiros, entre as chamas?

Coragem estupenda, — cem vezes mais admirável do que a dos soldados que afrontam a morte nos campos de batalha. Nos campos de batalha há as promoções: tal soldado, ao cabo de uma campanha, troca a blusa grosseira de guerreiro humilde pela farda agaloada de capitão, e até pela farda bordada de general. Mas neste campo de batalha contra o fogo, o heroísmo é obscuro, a gloria é anônima, a recompensa é nula.

Assombrosa luta! um homem, fraco, pequenino, humilde, contra o fogo que tudo pode!

Uma espessa atmosfera negra e impenetrável rodeia a casa incendiada... De repente, um grosso jato de água espanca e rasga a muralha de fumo; e, então, vêem-se lá em cima as salamandras heróicas, mourejando entre as la-

PIGMALIONO — Esta famosa peça teatral, original de George B. Shaw, foi traduzida para o Esperanto por Eva Suchardova e respresentada pelo grupo teatral do Clube Esperantista de Praga "La uerda ĉaro de Julio Baghy.

baredas, lambidas e enoveladas por elas, numa peleja sobrehumana!

Espetáculo que, uma vez contemplado, nunca mais é esquecido... E' a luta dos pigmeus contra o briareu de mil braços acesos. Este herói, rodando no ar a machadinha com que golpeia uma viga carbonizada, resplandece como Vulcano, dentro de uma chuva de ás-cuas vivas; aquele debate-se, como La-coonte, entre as roscas de serpentes igneas; aqueloutro, insensível às chamas que lhe remordem a face e as mãos, balança-se, pendurado a uma escada de corda, carregando um inválido, ou uma mulher, ou uma criança, que a sua bravura arrancou das garras de uma horrenda morte; — são as salamandras humanas, os gênios do fogo, não filhos dêle, mas seus inimigos e seus dominad-cres!

—

A tradução desta bela página virá no próximo número.

DR. KAMARYT

Faleceu em Praga, aos 73 anos de idade, em 30 de Julho 1956, um dos grandes esperantistas, o Dr. Stanislav Kamaryt. Esperantista desde 1900, muito fez por nossa língua. Era membro da *Akademio* de Esperanto. Colaborou na *Enciklopedio* de E. e na *Ĉeĥoslovaka Antologio*. O excelente *Filozofia Vortaro* é de sua autoria. Foi um dos mais eficientes trabalhadores pelo Esperanto.

VI-a Nordorienta Esperanto-Kunveno

En Fortaleza, ĉefurbo de ŝtato Ceará, efektiviĝis de la 5-a ĝis la 8-a de Julio la Sesa Nordorienta Esperanto-Kunveno.

Kun la ĉeesto de granda nombro da samideanoj el la ŝtatoj Ceará, Pernambuco kaj Rio Grande do Norte, ĝi konsistigis gravan kulturenan manifestadon en la bela tero de Iracema.

Prezidis la solenan malferman Kunvidon la Ŝtatestro D-ro Paulo Sarasate Ferreira Lopes, kiu gratulis la nordorientajn esperantistojn pro la realigo de la Esperanto-Kunveno. Parolis la reprezentantoj de la Ŝtatoj: Ceará, D-ro Fausto de Albuquerque; Pernambuco, Pastro Francisco Barros Leal kaj Rio Grande do Norte, S-ro Arlindo Castor de Lima. Poste parolis D-ro Alcimo Cavalcante de Aguiar, prezidanto de la Organiza Komitato, kaj la germana esperantisto E. Nigmo. Intertempe estis pianludado de klasikaj muzikverkoj kaj deklamado de poemoj.

Fermante la kunsidon, en siaj paroloj la Ŝtatestro rememorigis la pioniron de Esperanto en Ceará, D-ro Demócrito Rocha.

Dum unu el la laboraj kunsidoj, kiujn prezidis D-ro Fausto de Albuquerque, S-ro E. Nigmo estigis la ideon pri kreado de Nordorienta Esperanto-Federacio.

La kunvenantoj vizitis la redakcion de la ĵurnalo *O Povo* (La Popolo), fondita de Demócrito Rocha, kaj la tombejojn de ĉi tiu pioniro kaj de la esperantistino Neusa Nepomuceno. Ili estis ankaŭ afable akceptitaj de la Ŝtatestro, kaj ankaŭ de la ĉefurbestro D-ro Moreira da Rocha.

Dimanĉe matene oni inaŭguris la straton «Esperanto», situantan en unu el la plej elstaraj kvartaloj de Fortaleza.

La lastaj horoj estis dediĉitaj al vizitoj: al la Gimnazio «Presidente Vargas», ĉe kiu estas deviga la lernado de Esperanto; al la bieneto de S-ino Lucia Dummar, filino de Demócrito Rocha, proksime de la lago Mecejana; kaj al la ĵimo de nia samideanino Jovita Cavalcante.

Nokte okazis la ferma kunsido, prezidita de Generalo Celso Reis, reprezentanto de la Ĉefurbestro.

NOVAJ ESPERANT-KURSOJ

SÃO PAULO — Radio Progresso — ĉiu-vendredo je la 2,30 — instr. Arnaldo Vianna.

S.P.E.K. — Elementa kurso, instr. O. Leite de Moraes kaj J. Sampaio Leite; kompletiga, instr. Francisco Almada.

JUNDIAÍ — Clube 13 de Agosto (studenta); instr. Francisco Oliva.

PORTO ALEGRE — Soc. Esp. Alan Kardec, instr. Procópio Pereira.

PELOTAS — Soc. Esperantista de Pelotas.

RECIFE — Ĉe Colégio Marista.

PARANAÍ (Paraná) — E. Kurso, instr. Pedro Real, 40 lernantoj.

CURITIBA — Ĉe Ŝtata Biblioteko, speciale por anoj de la Legião de Boa Vontade, instr. Geraldo Mattos.

MAFRA KAJ RIO NEGRO, instr. Carlos Geiser.

DISTRITO FEDERAL — Grupo Esperantista Telmo Gonçalves Maia, Av. dos Italianos, 102; instr. Walkyres Martins Marques, 16 gelernantoj. Leopoldina Esperanto-Klubo, rua Miguel Ferreira, 266 — Ramos.



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,
Medeiros e Albuquerque,
Viriato Correia**

XXII

PETRO KAJ ROSA

Du personoj akompanis avide la enketon de la polico. Interese estis, ke ambaŭ estis nomataj Petro kaj ambaŭ sin konsideris kiel murdintojn de la bankiero.

Unu, ni jam scias, estis Albergaria. La alia, la rajtigito de Sanchez & Lapin, al kiu la maljunulo aludis en sia taglibro.

Efektive Sanches Lobo estis prava, kiam li diagnozis la malicecon de liaj intencoj per la rigardo. La bankiero, avara kaj sagaca, sciis tre bone distingi la karakterojn ĉe la nura vido. Se ne estus tiel, li ne estus povinta tiel eksterordinare sukcesi en sia kariero gajnante la grandegan riĉecon, kiun li ĝuis.

Petro Linck, usonano, reprezentanto de la firmo Sanchez & Lapin, estis perfekta friponego, aŭ, pli ĝuste, perfekta animo de friponego. Efektive ĝis tiam li estis plenuminta neniun grandan krimon. La malgrandaj ruzajoj, kiujn li faris tie kaj tie, estis for de la Kodo.

Tamen tio okazis ne tial, ke li sin detenis pro morala skrupulo, afero, pri kiu li havis neniun ekkonon, aŭ pro timo, kion li havis en tre malgranda skalo.

Li nur serĉadis okazon, bonan okazon por agi. Al li ne estis konvene fari iun el tiuj malgrandaj ŝteloj, kiuj estas krimoj, — se li povus fari iun el la grandaj, kiuj estas merito kaj honoro...

En tiu tago li sentis pli fortan tenton. Efektive la amorantino, kiun li senprudente faris sia konfidenculino, sciiginte, ke li estas enmaniginta al Sanches Lobo grandan sumon, lin instigis ekposedi ĝin.

La amorantino estis bela germana junulino, nomata Rosa Merck.

Petro Linck havis reale, kiel ĝuste devenis la polica sagaceco de Melo Bandeira, la nuran celon esplori la domon de la bankiero, kiam li venis por adiaŭi Sanches Lobo.

Kiam la bankiero kondukis lin ĝis la pordo, li rimarkis, ke en la domo ŝajne troviĝis servistoj, Li do nur malproksimiĝis iomete por doni al Sanches Lobo la tempon reiri al sia kabineto. Ne konvenis al li ataki la bankieron en la ĝardeno de la domo aŭ eĉ sur la teretaĝo pro tio, ke la maljunulo povus lukti kaj krii, kaj la bruo estus eble aŭdita.

Li faris kelkajn paŝojn kaj haltis je malgranda distanco.

Apenaŭ li faris tion, okazis kontraŭaĵo. La servistino de Sanches Lobo revenis al la domo.

Petro Linck konsideris la eblecon devi lukti. Li pensis, ke eble estus utile sin ĵeti al la junulino kun poŝtuko malsekigita per kloroformo. Kaj li havis nek armilojn nek kloroformon.

Li foriris por preni ilin en la hotelo, kie li havis ĉion en sia kofro.

Se li estus estinta pli pacienca, li estus vidinta, ke la servistino eliris denove tuj poste. Ŝi estis veninta nur por preni iun objekton.

Tuj post tiu dua eliro Albergaria eniris.

Li eniris, ŝtelis kaj sufokis la maljunulon.

Apenaŭ siavice li foriris, Petro Linck alvenis. Armita kaj kun pretigita poŝtuko, sur kiun li gutigis iom da kloroformo, li antaŭeniris singarde. Li timis iun renkonton. Sed okazis nenio. Kiam li atingis la kabineton de Sanches Lobo, li vidis la bankieron dorse sur la seĝo, kun la kapo mallevita. Li pensis, ke la bankiero dormas. Bonega okazo por apliki al li la kloroformon.

Sed dezirante konstati, ĉu la poŝtuko estas sufiĉe malsekigita, li rimarkis, ke la fluidaĵo elvaporigis preskaŭ tute. Ĝi ne efikus.

Ĝuste en tiu momento li vidis ŝnuron falinta apud la monkesto. Li antaŭeniris singarde, kun granda timo veki la ban-

kieron, kiun li pensis dormanta. Li preparis la maŝon, pasigis ĝin rapide cirkaŭ la kolo de Sanches Lobo kaj streĉis. Li havis la ĝojon vidi, ke la maljunulo eĉ ne moviĝas; sed la momento ne ebligis grandan trankvilecon por pripensi. Li akceptis la aferon kiel bonan kaj finitan — kaj sin ĵetis al la monkesto.

Tie atendis lin grandega elreviĝo: li ne trovis la ducent mil milrejsajn, kiujn li enmanigis al la bankiero.

Tamen li ne perdis tute sian tempon. Li trovis plurajn pakojn de sennomaj akcioj de diversaj entreprenoj kaj enpoŝigis ilin. Kiam li estis faranta tion, falis el lia poŝo la letereto de Rosa Merck. Ĉar la trovita letereto estis de Rosa Merck kaj skribita al li.

Kaj de tiam la kabineto de la bankiero ne plu estis tute malplena.

La tempo, kiun li uzis en tiuj esploroj, estis sufiĉa por la reveno de la servistino. Li estis elironta, kiam li aŭdis paŝojn. Li sin kaŝis malantaŭ kurteno kaj atendis.

Vidinte la mastron mortinta, la servistino malfermis la fenestron kaj kriegis por helpo. Homoj envenis. Petro Linck uzis la solan savrimedon resti kaŝita. Li jam ne sciis, kion li faru, kiam en la sekvanta mateno Majoro Melo Bandeira havis la bonegan ideon estingi la tutan lumon por funkciigi sian faman lanternon.

Linck decidis fari ekstreman povon. De la loko, kie li estis, li elpoŝigis la revolveron kaj faris pafon sur la lanternon.

Okazis tiam terura konfuzo, kaj li, kvankam en la mallumo, sukcesis forkuri ne vidite. Posttagmeze li enŝipiĝis al Santos.

Kiam la tiea polico devis demandi pri lia restado, li mem donis la informojn dirante, ke li jam estis en la urbo de la antaŭtago, kio cetere estis malvera, ĉar li alvenis en tiu mateno. Kaj de tiam li komencis sekvi avide la sciigojn pri la esploroj rilatajn al la krimo.

Li eĉ ne povis imagi, ke alia Petro, amoranto de alia Rosa kaj certa pri sia

krimo—krimo, kiun li ankaŭ opiniis sia — sekvis la aferon kun ne malpli granda avideco.

Petro Albergaria estis suferinta terurajn angorojn. Li havis en kelkaj okazoj plenan certecon, ke li sufokis la maljunan bankieron, plenan certecon, ke li ne ricevis kaj do ne portis iun letereton de sia amorantino. Sed en aliaj okazoj lia cerbo, lacigita de tiom da emocioj, lin kredigis, ke ili estis la farinto de la sufoko kaj ke eble la letereto apartenas al li.

Elreviĝoj.

La vero estas, ke, dum li ne lasis iun postsignon de sia paso, Petro Linck ebligis de sia. Nur la malkapableco de la polico povis preterlasi ilin.


Sed kelkaj ankoraŭ ekzistis. Estis precipe en la monkesto skatoleto el hinlako, kiu estis la savo de Melo Bandeira, kiam li en la tago post la vizito al la domo de Armeniã ektrovis ĝin en unu el la fakoj. Li ne tuŝis ĝin, nek lasis, ke oni ĝin tuŝu. Tuj vokitaj, la oficistoj de la Oficejo de Identigo ne havis malfacilaĵojn distingi la fingromakulojn de fortika mano.

Ili estis la postsignoj de la mano de Petro Linck.

MEDEIROS E ALBUQUERQUE. Tradukis K.

VI Convenção Nordestina de Esperanto

Por telegrama-circular de 28-7-1956, expedido pelo Gabinete Civil da Presidência da República, foi comunicado aos Ministérios e Órgãos doutrinários subordinados à Presidência da República haver sido dispensado o ponto aos servidores federais e autárquicos que compareceram à 6.ª Convenção Nordestina de Esperanto em Fortaleza. A dispensa foi somente cabível aos que comprovassem o comparecimento ao certame, mediante atestado da Liga Brasileira de Esperanto. (*Diário Oficial* de 28-7-56). Esta solução favorável teve a colaboração de nosso samideano Dr. A. C. Bonfim, funcionário do DASP.



Recenzo

Marjorie Boulton — KONTRALTE. Originala poemaro. — Antaŭparolo de William Auld. — Eldono de J. Régulo Pérez, Eldonisto, La Laguna, Kanariaj Insuloj, 1955. — 16 x 22,5 cm. — 288 paĝoj. — Prezo ĉe la libroservo de B.E.L. Cr\$ 130,00.

Ĉi tiu bela volumo estas la 5-a de la Belliteratura serio «Stafeto», komencita antaŭ kelkaj jaroj de nia brava samideano J. Régulo Pérez, kaj eble la plej originala el la verkoj ĝis nun aperintaj en Esperanto.

La genia aŭtorino estas tre nova esperantistino, sed jam estimata verkistino en sia nacia lingvo, la angla.

En sia antaŭparolo William Auld, vere kompetenta pri poezio, rimarkas, ke neniam ekzistis en la mondo vere granda poetino: ĉiuj plej famaj estis nur mezbonaj kompare kun la geniaj viraj poetoj, tial li opinias, ke la unua vere granda aperas nun kaj espereble «*skuos ĝisfundamente la ĝisnunan kulturon de la mondo*». Mi plene akceptas lian opinion. Atinginte la finon de la libro, mi tuj rekomencis la legadon por ĝui denove la belajn kaj kuraĝajn pensojn de tiu mirinda homo.

La unua parto de la libro, «*Trista Tenereco*», longa poemo formita el 26

sonetoj, rakontas pri ŝia profesia vivo kiel lektorino meze de junulinoj. Kiel facile ŝi plektas la 14 versojn de soneto kaj tuta sonetaro aperas kiel masiva poemo pri unu sama temo! La duan poemon ankaŭ formas sonetaro kaj rakontas pri ŝia unua amato — ŝia patro.

En mallonga poemeto ŝi priskribas en kortuŝa maniero pri lernejo de blindaj infanoj; kaj sekviĝas poemoj pri la plej malsamaj temoj. Nenion ŝi timas: pasian erotikecon ŝi rakontas vive, forte, kuraĝe en tre belaj strofoj; sed ŝi estas profunda pensulo kaj meditas pri ĉiu homo kiel universo de apartaj spertoj, sentoj, aspiroj... Legu mem tiun ĉi poemeton:

R I Ĉ O

*Ĉiu pasanto en la plena strato
Estas mistero vasta, plej profunda:
En lia koro kuŝas timoj, amoj,
Esperoj, pensoj, luktoj kaj debato,
Romankolekto kun temar' abunda,
Kaj ĉiutage dek aŭ dudek dramoj.*

*Ĉiu pasanto estas mil poemoj,
Eposoj kaj liriko, artikoloj,
Kantoj kaj epitaĵoj kaj arĥivo,
Geedziĝhimnoj, ankaŭ rekviemoj,
Biblioteko li, kun mil titoloj —
Senfina diverseco de la vivo!*

*Tutan alian vivon ni bezonus
Por ekkompreni vivon de alia,
Kaj nia scio estas nur asertoj.
Se nur ni povus koni, se ni konus!
Ni vidas nur, per nia sci' frakcia,
La riĉegecon de la homaj spertoj.*

Kvankam ŝi sentas — aŭ fantazias — voluptajn deziregojn plej pasiajn, ŝi tamen ne tro kredas la kontentigon de la karno kaj trovas la vivon pli kompleksa. Ni legu:

JEN, LA ŜTUPARO!

*La cinikulo dirus kun rikano:
«He, kio estas Amo — korpa juk' —
Kaj kuracebla estas la malsano!
Jen la ŝtuparo, kara! Supren! Ek!
Afer' facila kaj agrabla — iru
Kunfroti kaj forgesi — ne plu diru
Stultaĵojn pri la sentimento templa!»*

*Li pravus, eble, iomete, jes.
Jen la ŝtuparo kaj la korp' malsata.
Sed post kapjeŝo morna, post konfes'
Mi restus sur ŝtuparo, pli hezita.
Ĉu mi bezonas nur la erotikon?
Bezonas mi kunulon kaj amikon.
Ho, se la vivo estus tiel simpla!*

Ŝi sentas, ke la korpo kaj la spirito interbatalas, kaj plendas, jene:

KVERELO

*Ho damnaj malkongruoj!
Kial mia animo
Devas kuntreni
Pecan da grasa viando
Kun tiom da bezonantaj truoj!*

— *Kaj kial mi devas enteni
Animon, malplenan por frando?
Respondis mia korpo laŭ kutimo.*

Mi ne povus decidi, kion mi trovas plej bela en la libro. Ĉio tuŝas mian sentemon, diras al mi ion novan aŭ vekas ion malnovan! En serio da rondeloj ŝi laŭdas niajn samideanoj. Ni legu nur unu pri GASTON Waringhien:

*En nia kor' ni tenas gaston
Altestimatan kaj afablan,
Spertan, renomatan, sed agrablan
Al ĉiuj — li ignoras kaston.*

*Li bakas bonan vortopaston
Aŭ arton vere festotablan;
En nia kor' ni tenas gaston
Altestimatan kaj afablan.*

*Ĉiam li montras la kontraston:
La kleregecon — nu, diablan!
Kaj — anĝel-mildon ne probablan;
Granda, evitas li bombaston.*

En nia kor' ni tenas Gaston.

En la fino de la libro venas «Glosoj», de vortoj, kiuj ne troviĝas en la «Plena Vortaro», sed jam estas tre konataj en poezio.

La revizio de la libro estas perfekta: neniun preseraron mi trovis. La papero kaj preso estas tre bonaj kaj daŭros jarcentojn.

Retralegi ĉiam tiun ĉi belan volumon estas privilegio nur de niaj samideanoj: tiaj belaĵoj ne ekzistas en alia lingvo; ĉiuj poemoj estas vere originalaj!

I. G. B.

MEMORLIBRO

DE LA III-A ESPERANTISTA
EŬKARISTIA MONDKUNVENO

Verkita de Pastro D-ro Johano Baptisto
Kao O.F.M.

(Formato: 19x14 cm. kun 215 paĝoj de teksto, plus 75 ilustraĵoj; presita sur bonkvalita papero; akirebla ĉe Brazila Esperanto-Ligo; prezo: centkvindek kruzejroj aŭ du usonaj dolaroj).

INDEKSO

Dediĉa paĝo: Paroloj de Kristo
Antaŭparolo

Ĉapitro I. Klopodoj de organizo

1. Provizora plano de organizo de la "Esperantista Sekcio" en la 36-a Internacia Eŭkaristia Kongreso.
2. Intereso de I.K.U.E. por la III-a E.E.M.K.
3. Ĉirkulero de la Loka Organiza Komitato kaj la disdono de la "Internacia Bulteno".
4. Prizorgo por la paroladoj pri la Kongresa temaro kaj pri Esperanto movado.
5. La sidejo de la III-a E.E.M.K.

Ĉapitro II. Propagando kaj ehoj de simpatio

1. Eldono kaj disdono de la libreto "Preĝoj kaj Kantoj".
2. Propagando per gazetaro.
3. Ehoj de simpatio.
4. La programoj, ĝenerala de la 36-a I. E. Kongreso, kaj ĝenerala kaj detala de la III-a E.E.M.K.
5. Aligilo, membrokarto, tripinta flageto, insigno kaj granda afiŝo.

Ĉapitro III. Retrospektiva rakonto pri la III-a E.E.M.K.

1. Brilega kadro de la 36-a Internacia Eŭk. Kongreso.
2. Bonsukcesa disvolviĝo de la kunsidoj de la III-a E.E.M.K.
3. Danknoto de la L.O.K.

Ĉapitro IV. Salutaj paroladoj kaj poemoj

1. Esperantista Saluto al la 36-a Internacia Eŭk. Kongreso.
2. Inaŭgura parolado de Pastro J. B. Kao, en la Interkonatiĝa kunsido.

3. Saluta parolado de D-ro Carlos Domingues, prezidanto de B.E.L., farita okaze de la Interkonatiĝa kunsido.

4. Saluta parolado de S-ro Delio Pereira de Souza, prezidanto de Esp. As. de Rio de Janeiro, ĉe la Interkonatiĝa kunsido.

5. Salutpoemo de S-ro Petro Gobiĉ al la III-a Esp. Eŭk. Mondkunveno.

6. Eŭkaristia Poemo kun la saluto de S-ro Walter Mudrak.

7. Eho de la I-a E. E. Mondkunveno kun elkora saluto el Hungarujo.

Ĉapitro V. La Eŭkaristia Regno de Kristo kaj la Eklezio

1. La Eklezio estas la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Pastro Ludwig Thalmaier.

2. La Gravaj eraroj modernaj, teoriaj kaj praktikaj, en opozicio kontraŭ la Eklezio kiel Eŭkaristia Regno de Kristo.

Pastro Gabriel Pausback O. Carm.

3. La intensa vivo Eŭkaristia, rime- do por multigi la sacerdotajn alvokojn.

Pastro H. G. Wannemackers S. J.

Ĉapitro VI. La individuo en la Eŭkaristia Regno de Kristo

1. Devoj kaj rajtoj de la individuo kiel civitano en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Pastro Kanoniko I. Lagares.

2. Eraroj nuntempaj, teoriaj kaj praktikaj, en siaj rebatoj sur la individuo kiel civitano de la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Pastro Jean Vernoux S.C.J.

3. Eŭkaristio — nutraĵo kaj kuracilo de la homo kiel civitano en sia Regno. Lia Episkopa Moŝto Mons. José André de Coimbra.

4. La Eŭkaristio kaj la savo de la homoj (kiel civitanoj en sia Regno).

Pastro A. Beckers, prezidanto de IKUE.

Ĉapitro VII. La familio en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

1. La pozicio kaj misio de la kristana familio, kiel societo en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Pastro Modesto Carolfi O.F.M.

2. Aktualaj eraroj, teoriaj kaj praktikaj, koncernantaj la familion, kaj iliaj rebatoj sur ĝia pozicio kaj misio en la Eŭk. Regno de Kristo.

Frato Bertino Goerner O.S.F.

Ĉapitro VIII. La homa socio en la Eŭkaristia Regno de Kristo

1. La socio en sia koncepto kaj en ĉiuspecaj funkcioj en la Eŭkaristia Regno de Kristo.

Pastro Francisko de Barros Leal S.J.

2. Eŭkaristio-fonto de ĉiu bono socia, homa, universala, nacia kaj individua en sia Regno.

Pastro Antonio Borges S.J.

Ĉapitro IX. La Katolika Esperanto-movado en la servo de la Eŭkaristia Kristo

D-ro W. Solzbacher

1. La pioniroj de la unua periodo.

2. La Katolikaj Esperanto-organizaĵoj.

3. Diversaj faktoj pri la Katolika Esperanto-Movado.

Ĉapitro X. Esperanto kaj Religio

1. Esperanto kaj Katolikismo.

D-ro Mário Ritter Nunes, Sekretario de B.E.L.

2. Esperanto al la servo de nia Sankta Eklezio.

Profesoro Petro Real.

3. Kiel ni povas utiligi Esperanton por la bono de nia Religio?

D-ro Luis de Azeredo Coutinho, Komitatano de U.E.A.

Ĉapitro XI. Katolika Esperanto-movado en Brazilo

1. Kiel ni povas disvastigi Esperanton inter la Katolikoj en Brazilo?

S-ro Giovanni P. Faraco.

2. Kiel ni povas disvastigi Esperanton en la katolikaj rondoĵoj, precipe inter la katolikaj virinoj?

AŬSTRALIO HODIAŬ KAJ DANLANDO

Tiuj belaj, interesaj filmoj, afable pruntitaj al Brazila Esperanto-Ligo de la Legacioj de Aŭstralio kaj de Danlando, en Rio de Janeiro, estas prezentitaj en la salono de la Nacia Instituto de la Eduka Kinematografo, de la Ministerio de Edukado kaj Kulturo.

Ankaŭ per iniciato de *Legião de Boa Vontade* ili estas prezentitaj ĉe la orfejo Domo de Lazaro.

ASSINATURA ANUAL DE REVISTAS

	Cr\$
Amerika Esperantisto	120,00
Boletín	90,00
British Esperantist	120,00
Esperanto	150,00
Esperanto en Skotlando.....	30,00
Esperanto kaj Kulturo.....	100,00
Espero Katolika	75,00
Franca Esperantisto	80,00
Heroldo de Esperanto	135,00
L'esperanto	70,00
La nica literatura revuo	100,00
La Praktiko	120,00
Norda Prismo	100,00
Norvega Esperantisto	80,00
Oomoto	60,00
Scienca Revuo	100,00
Suda Stelo	80,00
Svenska Esperanto-Tidningen	140,00
Svisa Espero	90,00

O *Brazila Esperantisto* é distribuído gratuitamente a todos os membros da BEL.

LIVROS DIDÁCTICOS EM ESPERANTO

	Cr\$
«Sub la Verda Standardo» — Korte — Rektmetoda kurso por infanoj. 4 volumoj: Gvidilo, Laborilo I, Laborilo II, Memorigilo	120,00
«Junulkurso ilustrita» — SAT-amikaro	75,00
«La Juna Vivo» — Veenendaal-Bouwes — Lernolibro por infanoj	25,00

SERVIÇO DE LIVROS DA BEL.